

Heinrich Heine,  
Kie, laca vagabondo

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Kie, laca vagabondo,  
trafos mi al lasta hejm' ?  
Ĉu sub suda palmofrondo?  
Sub tilio apud Rejn' ?

Ĉu min en dezert' enfosos  
haste ies fremda man',  
aŭ en sablo mi ripozos  
borde de la ocean' ?

Kie ajn! Min la ĉieloj  
brakos, kiel tie ĉi,  
kaj funebro-lampe steloj  
ŝvebos nokte super mi.

*Traduko de la Germana poemo "Grabspruch" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kalocŝajo, \*1911 - †1976).*

*Arg-63-1083 (2010-05-26 19:45:24)*

Heinrich Heine,  
Tombosentenco

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Kie estos ripozejo  
lasta de migranto mi?  
Ĉu sub palmoj en forejo?  
Aŭ ĉe l' Rejno sub tili' ?

Ĉu enfosos min malpie  
iu en dezerta land' ?  
Aŭ ĉu mi ripozos ie  
en la sablo de marstrand' ?

Tamen, min ĉirkaŭos ĉie  
la ĉiel' de l' granda Di',  
steloj tie ĉi kaj tie  
lampe ŝvebos super mi.

*Traduko de la Germana poemo "Grabspruch" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1993.*

*MR-261-1c / Arg-63-123 (2010-05-26 19:44:33)*